

Joseph Freiherr von Eichendorff,

## La gaja migranto

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Se donas Di' al vi favoron,  
Li sendas vin for el la dom',  
Por montri sian mirlaboron,  
La belan mondon, al la  
hom'.

.....  
.....  
.....  
.....

De l' montoj riveretoj fluas,  
Alaŭdoj kantas super mi;  
Mi ankaŭ gajan kanton  
bruas  
Al la tutmonda harmoni'.

Al Dio fidas mi kun ĝojo.  
Li zorgas pri la tuta ter':  
Li ankaŭ min, sur mia vojo,  
Eterne gardos de danĝer'.

...

Joseph Freiherr von Eichendorff,

## La gaja migranto

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

Se Dio volas vin favori,  
Li igas iri vin tra l'mond'  
Por mirindaĵojn al vi montri  
En sia kreitaĵa rond'.

La malviglul' en hejma domo  
Ne ĝojas pro mateno lum',  
Lulanta li infanojn homo  
Zorgadas nur pro la ma-  
strum'.

Riveroj plaŭdas de  
l'montaro,  
Alaŭdoj ĝojas en aer' -  
Ĉu mi ne kantu kun birdaro  
Pro la de Dio bela ter'?

Kaj mi nur fidas bonan Di-  
on,  
Pro kiu konserviĝas ĝi;  
Ĉu mi do zorgu, timu ion?  
Pro li prosperos ankaŭ mi!

...

Joseph Freiherr von Eichendorff,

## Der frohe Wandersmann

Wem Gott will rechte Gunst erwei-  
sen,  
Den schickt er in die weite Welt,  
Dem will er seine Wunder weisen  
In Berg und Wald und Strom und  
Feld.

Die Trägen die zu Hause liegen,  
Erquicket nicht das Morgenrot,  
Sie wissen nur von Kinderwiegen,  
Von Sorgen, Last und Not um Brot.

Die Bächlein von den Bergen sprin-  
gen,  
Die Lerchen schwirren hoch vor  
Lust,  
Was soll ich nicht mit ihnen singen  
Aus voller Kehl und frischer Brust?

Den lieben Gott laß ich nun walten,  
Der Bächlein, Lerchen, Wald und  
Feld  
Und Erd und Himmel will erhalten,  
Hat auch mein Sach aufs best be-  
stellt.

...

*Traduko de la Germana poemo "Der frohe Wandersmann" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (\*1788-03-10 - †1857-11-26) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 - †1917-04-14).*

*Arg-234-462 (2008-04-01 19:09:17)*

*Traduko de la Germana poemo "Der frohe Wandersmann" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (\*1788-03-10 - †1857-11-26) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (\*1847-02-16 - †1919) en 1907.*

*Arg-234-463 (2006-05-07 20:26:26)*

*La tradukon mi, Manfred Retzlaff, prenis el la libro "Esperantista Kantaro", Kolekto unua: Germanaj kantoj popolaj kaj studentaj, Esperantigitaj de L. E. Meier, eldonita en 1907 de Hans Theodor Hoffmann, Berlin W. 35, Steglitzer Str. 44.*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (\*1788-03-10 - †1857-11-26).*

*Arg-234-461 (2012-10-04 22:20:58)*

*Lau poemo estas kantebla laŭ melodio verkita de Friedrich Theodor Fröhlich. Vidu: [http://www.lieder-archiv.de/lieder/show\\_song.php?ix=300144](http://www.lieder-archiv.de/lieder/show_song.php?ix=300144) kaj [http://de.wikipedia.org/wiki/Friedrich\\_Theodor\\_Fr%C3%B6hlich](http://de.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Theodor_Fr%C3%B6hlich).*